

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

DUA EPOKO - JARO II^a : APRILO 1922

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

Krom oficiala organo de la

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

ĝi estas vera.

LITERATURA REVUO

tute laŭfundamenta, organo de la

INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Sur ĝiaj paĝoj aperas la verkoj premiitaj en tiaj konkursoj kaj bonegaj tradukoj el la kataluna literaturo.

Jarabono : **5 pesetoj**

Redakcio kaj Administracio :

CARME, 30 — BARCELONA



Nia devizo: *Maro estas gutaro*

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

Redakcio kaj Administracio :
Carme, 30 : BARCELONA

Redaktoro : **Jaume Grau Casas**

Propagando en la Barcelona Specimena Foiro



BKAZIS kun plena sukceso, de la 15^a ĝis la 25^a de Marto, la III^a Oficiala Foiro de Specimenoj (I^a Internacia) de Barcelono.

Dank' al tio ke unu el la altaj oficoj de la Foiro estas plenumata de fervora eminenta samideano, ĝi enkondukis Esperanton jam de longe en siajn internaciajn rilatojn. Belaj esperantaj murafiŝoj kaj esperantaj cirkuleroj estis eldonataj.

Sed ne nur la Foiro *uzis* la lingvon; ankaŭ ĝia Komitato volis helpi ĝian propagandon. Tiucele oni disponigis por la «Kataluna Esperantista Federacio» unu el la standoj, kie estis instalata oficiala informejo de la Foiro kaj samtempe esperanta ekspozicio kaj propagandejo.

Ornamis nian barakon la portreto de D-ro Zamenhof kaj la esperantista flago, ekspozicio de poŝtkartoj kaj fotografaĵoj, kolekto de la esperantistaj gazetoj nun aperantaj, multnombraj volumoj el la esperanta literaturo, komercaj katalogoj kaj presaĵoj, afiŝoj de diversaj Specimenaj Foiroj...

Estis disdonataj al la vizitantoj 10.000 propagand-folioj pri Esperanto speciale eldonitaj de K. E. F. kaj 3.000 katalunaj ŝlosiloj. Ankaŭ oni disdonis ekzemplerojn de nunaj esperantaj gazetoj al preterpasantoj kiuj montriĝis iamaj esperantistoj, por denove altiri ilin al nia movado. Estis vendejo de lernolibroj, vortaroj kaj literaturaj verkoj.

La 19. de Marto vizitis la Foiron kun speciala permeso la membroj de Esperanta Grupo «Aplec», el Sabadell, kaj multnombraj samideanoj el Barcelona. Dum tiu tago estis permesata la eniro al ĉiuj surportantaj la verdan stelon.

Resume, per la instalado de nia esperanta informejo estis farata vasta kaj efika propagando. Ne nur ni varbis novajn adeptojn sed ankaŭ kelkaj malnovaj samideanoj aliĝis al K. E. F. La fakto ke multaj Specimenaj Foiroj, krom la Barcelona, uzas Esperanton, pri kiu parolis la miloj da presaĵoj disdonitaj, videble impresis la publikon. Ni intencas aranĝi por la venonta Foiro ankoraŭ pli gravan propagandon, kompreneble kun la afabla helpo de la Foira Komitato.

Fine, ni dankeme citu la nomojn de la Barcelonaj grupoj «Paco kaj Amo», «Nova Sento», «Barcelona Stelo» kaj «Semo», kiuj kontribuis al la sukceso de nia entrepreno, proponante deĵorantojn por la daŭro de la Foiro kaj laŭpovan monsubtenon.



Kataluna karavano al Franca Kongreso en Béziers

La sciigo, ke la francaj samideanoj invitis nin ĉeesti ilian kongreson, estas ricevita kun ĝojo de la kataluna samideanaro. La belaj festoj okazontaj dum la Franca kongreso estos sendube forta allogo al ĉeesto.

Kelkaj samideanoj el Barcelona, Sabadell kaj Girona esprimis jam sian deziron aliĝi al la karavano aranĝota per la valora helpo de Profesoro G. Roy, el Gaillac (Tarn). Li vizitos Barcelonon dum la Paskaj tagoj kaj ni havos okazon pritrakti ĉiujn detalojn, ĉefe tiujn pri plej facila transiro de la landlimo. Dank' al tio en nia proksima numero ni povos bone informi ĉiujn pri la veturo al Béziers.

Jen la prezo de la vojaĝo:

	<u>2.^a klaso</u>	<u>3.^a klaso</u>
De Barcelona al Cerbère Ptoj.	11'95	Ptoj. 7'10
De Cerbère al Béziers Fkoj.	19'05	Fkoj. 12'15

Tiujn rabatitajn prezojn povos profiti nur la karavananoj.

Pri la elspezoj pro loĝado kaj ceteraj, konsultu la programon dissenditan en nia antaŭa numero. Kongresa kotizo: 8 frankoj.

Konkurso kun monpremioj

POR GEKONGRESANOJ ANKORAU NE 20 JARAJ

1^a PREMIO : 350 FRANKOJ. — Premio *Mercerie «A l' Esperanto»*, (avenue Maréchal Foch, Béziers) kaj *Beziersa Stelo*.

La estro de l' suprecitita firmo bonvolis doni por nia konkurso 200 fr. kiel pruvon de dank sento al Roksano, kiu faris al li servon; kaj por plialtigi la valoron de tiu premio, la geanoj de *Beziersa Stelo* tutvolonte foroferis 150 fr. el la 300 fr. al ili promesitaj kiel rekompenco.

2^a PREMIO : 250 FRANKOJ. — Premio *Henriko Farman, aviadisto*. La konkurso konsistos el:

1e Skribparto. — Francigo de teksto Esperante diktita — Esperantigo de franca teksto.

2e Parolparto. — Apliko de gramatikaj reguloj esperante klarigitaj. Esperanta rakonto pri la vivo de D-ro L. L. Zamenhof aŭ pri la historio de Esperanto.

La Festo de Sankta Johano

(Arangita laŭ resuma originalo de Juli Soler, en lia verko «La Vall d'Aràn»).



GN tiuj tiel arte kaj nature kaŝitaj pireneaj valoj, kie, meze de la velure verdaj herbotapiŝoj, tiel bele la vilaĝetoj sidas sub la protektanta ŝirmo de la altegaj, preskaŭ nemezureblaj montoj, oni dirus, ke nur en la junia monato ekkrevas printempo; kiam la flava, orumita disko de suno venke elŝiris la densan nubovualon, kiu dum tuta longega, neniam ĉesonta vintro karesadis la kampojn malsekajn; kiam la sunradioj ankoraŭ iom tremantaj timeme falas sur la valojn, en ili estas kvazaŭ subita vekigo, kvazaŭ eksplodo de vivo: ŝirigas, jen, tie-ĉi kaj tie la longega neĝa mantelo, kiu platis kaj unuformigis la pejzaĝon, tra la ŝiraĵoj gutadas kaj fluas la akvo de degelado, la torentoj fluas pli abunde, la kreskaĵoj rompas per sia verda koloro la blankan unu-tonecon kaj diversloke sin ornamas per la simplaj kaj luksaj brilantoj de siaj floretoj; la aero fariĝas tiel pura, ravanta kaj lazura! matene, ĉe sunlevigo, kiam la montpintoj estas rozkoloraj kiel virgulino-vangoj, ĝi tiel parfume, forte odoras! Ho bela kaj plena de allogoj altmontara somerkrevo!

Apud la ondanta rivereto kiu ĉiam kantanta foriras, rave rigardante kaj sin spegulante sur ĝi kuŝas la blanka kaj trankvila vilaĝeto, tiu ardo de domoj malnovaj kunigitaj ĉirkaŭ kaj sub la gardestaranta, mezalta, pinta sonorilejo, kvazaŭ ŝafaro timeme kolektiĝinta ĉirkaŭ sia paŝtisto. Bela, pura, serena mateno hodiaŭ, festotago de Sankta Johano, la plej gaja kaj bela tago de Junio. Frumatene, en tiu kvieta kaj modesta vilaĝeto de la valo de Aràn, tiu lando kaŝita inter la faldoj de la Pireneo, ĉe la limoj de Francujo, dum la tuta vintro izolita kaj preskaŭ tute apartigita de siaj najbaraj landoj, oni renkontas en la stratoj pli multe da vilaĝanoj ol ordinare, kiuj, iom post iom, en agrabla interbabilado kaj malrapida promenado, kolektiĝas sur la malglataj kaj neegalaj brikoj el kiuj konsistas la pavimo de la placo, kie devas okazi la komenco de la bela ceremonio, spegulo de vilaĝanaj moroj, kiu ĉiujare okazas en la tago de tiu tutmonde solenigata festo. Kiam ĉiuj tie troviĝas, oni elektas inter la vilaĝanoj geedziĝintaj dum la jaro la plej junan paron, kaj la aŭtoritatuloj, kiel kutime, cedas al ili la rajton kaj devon iri en la arbaron, elekti inter la altaj arboj, belan, konvenan abion kaj ĝin segante faligi; tiu abio taŭgas por konstrui la *haro 'n*, vorto kiu en ilia lingvo havas signifon de lumturo; ili tranĉas la abion laŭ longeco de 8-10 metroj, senŝeligas ĝin, fendas ĝin ĉe la pinto kaj ĉe aliaj partoj de la arbokrono pere de lignaj fostetoj aŭ kojnoj, kiuj restas tie enpremitaj; kiam ĝi estas jam tute pretigita ili kondukas ĝin al la placo kaj en la sama mateno ili starigas ĝin en ĝia mezo, kun ĝia kripligita kapo supren direktita; la *haro* estas jam konstruita.

Posttagmeze, kiam ĉiuj forleviĝis el la familiaj tabloj, finita la abunda

resta tagmanĝo, denove la *haro* kolektigas la vilaĝanojn, kaj speciale la geedziĝintojn ĉar por ili okazas la festo. Kiam ĉiuj tie staras, eliĝas el la amaso ĝojanta tri vilaĝaninoj, junaj edzinoj, kiuj, en sia plej bela kostumo, ĉarma kombajo, manĉoj girdandojn el belaj kampaj floroj, dance rondiras ĉirkaŭ la *haro* dum en ilia mezo sin intermetas alia vilaĝanino kiu tenas ankaŭ girlandon kaj krucon el floroj. Tiam, junulo ensaltas la rondon kaj facile surgrimpas la arbon; post tio li ricevas de la edzinoj malsupre starantaj la girlandon el floroj, kiun li ĉirkaŭligas ĉe la branĉoj de l' arbo kaj fine kronas ĉion per la florkruco. Tiam la vilaĝaninoj ronde ekdancas kaj kune kantas belan vilaĝan kanton al kiu konvene respondas la junulo sur la arbo.

KANTO DE LA EDZINOJ

Tiu tiel malvarmeta rivero kiun mi estas trapasonta,
 kiu portos tiun girlandon, donu al mi helpon.
 Tiuj blankaj kapuĉoj kiujn la vento flirtigas,
 tiuj ĝentilaj junuloj la saĝecon al mi forrabis.

Tiun bukedon mi al vi proponas, povu mi ripozi de mia vivo
 se mia vivo estas tiel granda turmento, tiun bukedon mi proponas.

k. t. p.

RESPONDO DE LA JUNULO SUR LA ARBO

La bukedon mi akceptos kaj la amon ankaŭ,
 kaj rememoros mi kiu bonon al mi deziras.
 La ŝtuparoj rompitaĵ estas. Kiel mi, malĝoja, malsuprenvenos?
 De branĉo al branĉo mi desaltos kaj vin ĉirkaŭprenos.

k. t. p.

Kiam la kanto finiĝis, la edzinoj gracie donacas al siaj respektivaj edzoj malgrandan florbukedon kaj tiam ĉiuj kune, kantante kaj ridante, bruan- te kaj babilante, marŝas pogrupo ĝis nemalproksima kampara angulo, en kies mezo falas, kun sia eterna lulado, la akvofluo de fonto kantanta; tie ili faras per sia vespermanĝo abundan konsumon de fromaĝo, vino, brando kaj ŝercoj ĝis kiam jam satigitaj kaj ankoraŭ pli gajaj, ili reatingas la vilaĝon kie la *haro* denove ilin kolektigas. Jen, ili estas nun vestitaj per siaj edziĝo- festaj kostumoj, kio kaŭzas neordinaran aspekton kaj ĉarme beligas la vilaĝan placon; tuj, kompreneble, estiĝas danco, kiun malfermas la unua edziĝintino de la jaro kaj kiun nur la dum la jaro edziniĝintaj povas partopreni; poste estas permesate al la ceteraj pli malnovaj paroj kundanci kaj tiel daŭras la festo, kun granda amuziĝo kaj svaĝo, ĝis alta nokto.

La *haro* restas dum la tuta jaro, melankolie staranta, kiel pasiva me-

morigilo de forpasinta gajeco, kiel maljuna forvelkaĵo, ĝis la antaŭvespero de Sankta Johano, ĝis tiu feliĉa nokto, krevanta de amoj kaj revoj, de kantoj al amatinoj, de tiu nokto kiun ĉie la poetoj laŭde kantis per siaj plej belaj esprimoj, la plej blua, serena kaj harmonia nokto de la jaro, tiu dum kiu la firmamento malfaldas plej fiere kaj lukse sian riĉegan veluran mantelon disŝutitan de steloj kaj lumo. En tiu nokto, ĉie festata, la *haro*, dum la tuta jaro starinta, denove kunvokas la vilaĝanojn; grandaj kaj malgrandaj, virinoj aŭ viroj, ĉiuj tien venas, kun ĝojigitaj koroj, antaŭrataj de la pastro kiu unue, preĝojn murmurante, benas la *haron*; tuj poste la viroj aspergas ĝin per gudro aŭ petrolo kaj fine ĝin ekbruligas. Iom post iom la flamoj sin levas, ardante kaj tordante sin; ili ĝin lekas kaj karesas, ili incensas ĝin per sia fumado kaj baldaŭ la ruĝkoloraj langoj formas brilegantan plumpfaskon kiu disverŝas varmon kaj lumon super la homplenan placon. Tiam ensaltas la infanaro, kiu, mantene faskon de lignaĵo, aŭ ŝelojn de ĉerizarbo herboligitajn aŭ ankaŭ pecon da malnova ledsako, ilin bruligas kaj kune rapide ekdancas ĉirkaŭ la flamoj, kun kantoj kaj krioj, rondkurante ĝis laciĝo.

Tio estas, certe, en sia natura scenejo fantazia ludo, brila spektaklo, kaj samtempe granda amuzo; tiu tradicia festo estas sendube unu el la plej tipaj variaĵoj de la tiel vastigitaj brulfestoj de la antaŭvespero de Sankta Johano.

La restaĵoj de la *haro*, la morgaŭon matene, estas vendataj aŭkcie, kaj la mono el ĝi enspezita taŭgas por la vespermanĝo kaj ceteraj elspezoj de la festo.

Poste ili restarigas la novan kun la jam priskribita ceremonio.

JULI SOLER

El kataluna lingvo tradukis

MARIAN SOLÀ

Premiita en la VIIIaj Internaciaj Floraj Ludoj.



Konkurenco

- Pasintan nokton, knabino mia,
en song' feliĉon atingis mi.
- Ho karuleto, dum nokto tia,
ol vi feliĉa mi estis pli.
- Ne kredu tion! la song' ja estis
ke mi lipkisis vin kun fervor'...
- Mi songis same! kaj poste?—Restis
ambaŭ brakpreme ni kor' ĉe kor'...
- Same! kaj poste? — Poste... jam mia
feliĉ' ne daŭris, knabin' ho ve,
ĉar mi vekigis el songo tia...
- Ĉu vi vekigis? Ha, do mi... ne!

ARTUR DOMÈNECH

La feinoj

Malfrunokte, kiam steloj
per malfiksa, brila trem'
ŝajnas diri pri mirbeloj
de sorĉoj aŭ de timem',
kun maljunulo zorganta
je ŝafaro sin paŝtanta,
junul' en mallum' restanta
parolas pri jena tem'.

— Ĉu vi ne aŭdis je fojo
perditajn en malproksim'
dolĉajn kantadojn de ĝojo,
de senkompara esprim' ?
Ĉu vi ne miris avide,
kvazaŭ en sonĝo senvide,
pro revaj', kiu rapide
traflugis spacon sen lim' ? —

— Ja mi scias pri l' demando. —
— Parolu do pri l' afer' ! —
— Mi scias, ke fein-bando
iras en ombro sub ter'
neniam de sun' vidite,
al mallumo kondamnite
de kiam en mond' subite
ekstariĝis Kruco-Ver'.

Ĉe akvbordoj aŭ arbaroj,
apud lagoj aŭ torent',
ili ĝuis per fuŝfaroj
en tre antikva moment'.
Ĉiu loĝadis en kavo,
plektante florojn de ravo :
allogon por fari sklavo
kaptiton de ŝia tent'.

En tiu tempo parolis
birdoj, arboj, vent', lagun',
ĉar ili sorĉe petolis
tra ĉiu lok' en komun';
ĝis ne atendita tago,
kiam el bordoj de lago
forkuris en erarvago
dispelitaj de la sun'.

Tra abismoj kaj kavajoj
ilin glutis ter' en sin,
kaj per novaj mirindaĵoj
ili belflorigis ĝin.
En la malluma karcero
faris domojn de mistero,
banoĉambrojn de ĥimero,
kiajn ne havas Reĝin'.


La kavoj kun degutejoj,
admiro, kaŭzo de ĝu',
estas sole enirejoj
al la mirinda konstru'.
Tie loĝas silenteme
la feinoj kaj ploreme
ŝpinadas, dum ilin treme
lumigas nur okulblu'.

Same kiel noktaj bestoj,
ili ne vidas ĉe lum',
kaj havas sur ter' por festoj
noktojn de densa mallum';
tiam eliras el rokoj
kaj flugadas super lokoj,
kie de amaj epokoj
flosas ankoraŭ parfum'.

Ve, al solul' en vojiro!
 Ve, al perdita vagant',
 kiu sekvas en deliro
 trilojn de ilia kant'!
 Povon sin gvidi perdinte,
 en kavernon erarinte,
 sen helpo tie mortinte,
 li fariĝos ŝtona plant'! —

Malfrunokte, kiam steloj
 per malfiksa, brila trem'
 ŝajnas diri pri mirbeloj
 de sorĉoj aŭ de timem',
 apud ŝafar' sin paŝtanta,
 kun paŝtisto ĝin zorganta
 junul' en mallum' restanta
 parolis pri tiu tem'.

MIQUEL COSTA I LLOBERA



Lampiro

Nokt' de somer',
 nokt' de parfum',
 raŭpo de lum'
 kun la lantern'

tra la ĝarden',
 laŭ la hazard',
 vagas por gard',
 vagas sen cel'.

Dum la vagad',
 tra la mallum',
 aŭdiĝas zum'
 de kisa ŝmac'.

Somer' de am'!
 Nokt' de parfum'!
 Malbrilas lum'.
 Ekridas raŭp'.

JOAN MARIA GUASCH

El kataluna lingvo tradukis
 JOSEP GRAU CASAS

La Dancanta Procesio de Echternach



A longa vagonaro plenplena je pilgrimantoj forlasas la stacidomon de Luxemburg. En ĉiuj fakoj de la larĝaj kaj puraj vagonoj parolas aŭ preĝas, rozario en manoj, la premegataj vojaĝantoj, plejparte kamparanoj el najbaraj regionoj.

De multaj jaroj, kiel ŝatanto de folkloro, mi deziris vidi tiun strangan procesion de Echternach en kiu miksiĝas plej granda katolika kredo kaj plej laika temo. Ĉu tiu eksterordinara religia festo prezentigos kiel mi ĝin ĉiam imagis? Lulita de la vagonaro mi rememoras strangajn malnovajn bildojn similajn al tiuj de Callot, sur kiuj plugistoj maljunaj, pastroj kaj akolitaj, tenantaj la religiajn flagojn, alten levas la genuon, sin sekvantaj en longa saltanta procesio.

La vagonaro trairas tra montetoj verdaj, serpentiraj riveroj, profundaj arbaroj. Brila suno verŝas sur la tutan landon ĝojan lumon kaj pezan varmecon.

Fine la speciala vagonaro alvenas al la celo de sia vojaĝo: Echternach. Bela ridetanta urbeto kun granda preĝejo, ĉirkaŭata de rivero sur kies deklivoj kreskas vinberoj. La specialaj kaj ordinaraj vagonaroj verŝas en ĝin amason da popolo: viroj kun energiaj bronzitaj vizaĝoj ombritaj de larĝa felta ĉapelo, kamparanoj kun larĝaj roboj, junuloj kaj fraŭlinoj el la urbo, kies pala haŭto kontrastas kun tiu de la kamparanoj. Tiu amaso plenigas la stratojn per gaja vivo.

Je la fiksita tempo, sur la ponto trairanta la riveron Suure ornamita de malnova pastra statuo, ekiras la procesio, kiu dum longaj horoj serpentiros tra la stratoj de la urbeto.

Venas la pedelo, sekvata de la akolitaj portantaj la krucon; poste pluraj pastroj kaj subpastroj, vestitaj per orumitaj dalmatikoj brilantaj sub la suno, kantas plengorĝe latinajn psalmojn. Ili estas sekvataj de pli ol 5.000 pilgrimantoj, kiuj, grupigitaj laŭ aĝo kaj sekso, tenas sin per la mano po vicoj de 5 aŭ 6 personoj. Tiuj grupoj estas dividitaj per muzikistaroj, ĉu violonaj ĉu blovinstrumentaj.

Imagu tiun longegan procesion kun la bruado de la muzikoj ludantaj laŭvice la saman mezepokan gajan arion, laŭ takto de malrapida polko. Imagu la sekvantaron laŭmezure farantan tri paŝojn antaŭen, du malantaŭen laŭ tiu danciga ario, kaj vi havos bildon de tiu kelkhora laciga procesio. La suno ardas pli kaj pli, la ŝvitantaj dancantoj ne plu sin tenas senpere per la manoj sed intermetis la malseketajn poŝtukojn, vizaĝoj rugiĝas pro laceco kaj varmegeco, kaj la longa procesio de dancantoj pasas senĉese. Jen junuletoj post aro da violonoj, kiuj kun la ardo de la juneco faras ne tri sed kvin paŝojn antaŭen, ne du sed kvar paŝojn malantaŭen! Jen

maljunulinoj kun kufoj, kiuj malgraŭ sia granda aĝo, kun obstineco kaj streĉita forto dancas malgrandpaŝe post sia vilaĝa muzikistaro.

Estas tiom da seriozeco kaj kredo sur la vizaĝoj de la pilgrimantoj ke eĉ la plej ŝercemaj fremdaj videmuloj eĉ ne kuraĝas rideti.

Fine, post tiu senfina sekvantaro, venas psalmokantantaj pastroj kaj sub la ora baldakeno la episkopo benas la sinsurgenuantan amason da rigardantoj premegataj sur la mallarĝaj trotuaroj.

La procesio marŝas longajn horojn laŭ tiu nerapida sed laciga irado. Fine ĝi alvenas en la preĝejon kaj rondiras ĝin, dancante plej energie antaŭ la belega marmora relikvujo kie ripozas la ostoj de Sankta Willibrod.

Post tiu lasta dancirado en la malvarmeta preĝejo la pilgrimantoj disiĝas por sin refortigi kaj sensoifigi: la procesio finiĝis.

La komunuma festo okazas samtage kaj la pilgrimantoj sin amuzas tiam, rajdante sur karusejoj kaj aĉetas bagatelojn ĉe la plenaeraj butikoj.

La deveno de tiu unuavide burleska kaj malpia kutimo estas tre malnova. En la dektria jarcento la brutaro de tiu regiono havis nervan malsanon. La popolo petis resaniĝon al Sankta Willibrod per procesio ĉe kiu ili imitis la malsanajn bestojn. La sanktulo plenumis ĝian preĝon kaj la kamparanoj promesis ĉiujare rekomenci, la mardon de Pentekosto, tiun dancantan procesion, vere ne amuzan sed pli similan al pentofarado.

La pentrinda sceno ekstreme interesis min. La realaĵo estis pli tipa ol mia imago ĝin pentris. Nur la pastroj ne dancis laŭ la vidita malnova gravuraĵo.

El la sunoplena urbo foriris la amazo kaj plenigis la ardevarmigitajn vagonojn; reirante Luxemburg' on mi pensis, ke ni estas feliĉaj ankoraŭ vidi tiajn karakterizajn festojn kiuj feliĉe ne ankoraŭ malaperis antaŭ la nuna civilizacio, kiu banale egaligas ĉion, donas al ĉiuj popoloj la samajn malbelajn vestaĵojn, samtipaĵajn meblojn kaj senegalajn unuformecon en la vivo.

Originale verkis

RENAUD RICHEZ

Premiita en la VIIIaj Internaciaj Floraj Ludoj.



Bibliografio

TRI ANGLOJ ALILANDE — Romano originale verkita en Esperanto, de John Merchant. Eldonis : Brita Esperantista Asocio, 17 Hart Street, London, W. C. 1. Dua eldono; 1922. Prezo : aŭfrankite 5 respondkuponoj.

Jen bela romano verkita en bonstila esperanta lingvo, plena de angla humoro. Dum ĝia legado, ŝajnas ke oni ĝuas unu el tiuj modernaj anglaj noveloj, el sprita naiveco, kaj oni admiras la arton per kiu la aŭtoro adaptas nian karan lingvon al siaj pensoj. Estas la temo kelkaj ridigaj aventuroj de la tri angloj Tom Brown, Charlie Robinson kaj Jack Morris dum vojaĝo al Francujo, Belgujo kaj Germanujo, en kiu ili spertas oftajn erarkomprenojn kaj kun aprobo fine sciigas pri Esperanto. Oni legas kun intereso la 11 ĉapitrojn de tiu ĉarma verketo.

ANEKDOTOJ PRI DANTE. — Elektitaj kaj tradukitaj de B. kaj E. Migliorini. Kolekto de «L' Esperanto», S. Vito al Tagliamento (Italujo). Prezo : 0'50 Fr.

Antaŭparolo kun sciigoj pri la vivo de Dante kaj dek sep kuriozaj anekdotoj pri la senmorta aŭtoro de la «Commedia». Jen unu el ili : *Dante ne estas hundo*. Iumatene, dum Dante manĝis en la domo de Cane della Scala, liaj filoj kaj ĉiuj ĉeestantoj jetis la ostojn ĉe la piedojn de Dante, ĉar ili deziris aŭdi de li ian spritaĵon. Kiam oni levis la tablon, laŭ la kutimo, ĉiuj vidis la multegon da ostoj.

Tuj Dante diris : «De tio oni povas vidi, ke mi ne estas hundo kiel la aliaj, ĉar mi ne manĝis la ostojn kiel vi».

A EVOLUÇÃO HUMANA E O ESPERANTO. — Parolado farita de D-ro Moreira Guimaraes, en la solena malferma kunsido de la VI^a Brazila Kongreso de Esperanto.

En tiu parolado, per portugala lingvo, estas farata studo pri la diverseco de lingvoj kaj ebleco de lingvo arta internacia. Ĝi enhavas tre interesajn konsiderojn el filozofia kaj morala vidpunkto. Ĝi finiĝas per la jenaj vortoj : «Somente assim, sentindo cada patria todas as energias de sua alma, a humanidade cessará de ser uma ficção sob a qual os povos luctam e se esphacelam ou se desagregam na desordem que vem de muito longe na historia para representar o que vale effectivamente a humanidade, sem cujo impulso nada é possível no terreno das grandes realizações moraes, ou na esphera da intelligencia e do coração. Sejamos patriotas. Mas sejamos igualmente humanos — sentindo, bem no intimo de nós mesmos, todo o amor da humanidade».

WIESBADEN, INTERNACIA BANURBO. — Propaganda folio, bele ilustrita,

pri la fama germana urbo. Havebla senpage laŭ simpla mendo poŝtkarte. Eldonis: Städtisches Verkehrsbureau — Wiesbaden.

POŜKALENDARETO POR ESPERANTISTOJ. 1922. — Kompilita de Karl Minor. Eldonis: Esperanto - Verlag Friedrich Ellersiek, Berlin S 59. Prezo: 4'50 markoj.

Interalie ĝi enhavas la hebrean kalendon, luteranajn festotagojn kaj katolikajn festotagojn. Kelkaj sciigoj pri la historio de Esperanto kaj organizaĵoj esperantistaj ornamas la broŝureton.

QUELQUES-UNS DES DERNIERS SUCCÉS DE L'ESPERANTO. — Folio eldonita de «Esperanto-Office de Lyon», sciiganta pri kelkaj el la lastaj sukcesoj de Esperanto. Tre bona por la propagando.

TUTTO L'ESPERANTO IN UN FOGLIO. — Vortaro, gramatiko, prononcado, vortformado, klarigataj de J. Borel. Eldonis: Itala Katedro de Esperanto, Via de Gombruti, 7, Bologna.

LA KATOLIKA ESPERANTO-MOVADO KAJ ĜIA ORGANO ESPERO KATOLIKA. — Broŝuro eldonita de E. K. en Udenhout (Nederlando) pri la reapero de la malnova katolika gazeto kaj pri internaj aferoj de la katolikaj esperantistoj.

PRO ESPERANTO. — Eldonaĵo de la Barcelona grupo «La Rondo», str. Provença, 131, kun antaŭparolo de Rafael de San Millàn kaj gramatika resumo de F. Pujulà i Vallès.

Necesa klarigo

El kelkaj ricevitaj leteroj — cetere enhavantaj gratulojn por *Kataluna Esperantisto* kaj ĝiaj kunlaborantoj — ni ĉerpis la certecon, ke ekzistas konfuzo pri la Redaktoro de nia gazeto.

S-ro Josep Grau Casas, Lingvo-Komitatano, Prezidinto de la Internaciaj Floraj Ludoj, eminenta oratoro kaj lerta tradukinto de multnombraj katalunaj versaĵoj, *estis* dum kelkaj jaroj Redaktoro de K. E.

La nuna Redaktoro de K. E. estas lia pli juna frato, 25-jara, S-ro Jaume Grau Casas.

EKSTERLANDA MOVADO

En Toronto (Norda Ameriko), la Amerika Asocio por la Antaŭenigo de la Sciencoj, en sia kunsido de la 30^a de Novembro, proklamis la urĝan bezonon de internacia helplingvo kaj oni elektis komisionon por sin informi pri tiu grava afero.

— La Ĉeĥoslovaka Ministerio por Publika Instruado, per oficiala dekreto de la 30^a de Septembro, aprobis esperantan lernolibron por ceĥoj, verkitan de Fino Ŝupichova.

En Dotnava (Litovujo) la studentoj de Agronomia lernejo aranĝis Esp. grupon nomitan «Verda Kverko», kaj ĝia biblioteko jam enhavas preskaŭ 200 volumojn. Ankaŭ fondiĝis grupoj en Surbakas, Jonava k. a.

— La Ligue Maritime et Coloniale Française, en sia kunveno de la 13^a de Januaro, esprimis la jenajn voĉdezirojn :

1.^a Ke la Ministro de Militaj Maraferoj kaj la Ŝtata Subsekretario de komercaj maraferoj favoru la instruadon de Esperanto ĉe la lernejoj dependantaj de ĝia aŭtoritato.

2.^a Ke la Hidrografia fako estu invitata proponi rimedojn por enkonduki Esperanton en ĝiajn rilatojn kun similaj fakoj eksterlandaj.

3.^a Ke la Societo de Transportŝipoj invitu siajn oficistojn lerni kaj uzi Esperanton, precipe sur la ŝipoj kiuj transportas fremdajn pasaĝerojn.

— La Senato de libera urbo Dancig voĉdonis monatan subvencion de 1.000 markoj al la Danciga Esperanto - Asocio.

— Dank' al klopodoj de S-ro Alessio, oni aranĝis tri liberajn kursojn de Esp. ĉe la «Regio Instituto Nautico» el Bari (Italujo). Estas rimarkinde ke preskaŭ la tuta studentaro ĉeestas la klarigojn de tiuj kursoj.

— La Ministro de Publika Instruado permesis al la direktoro

de la liceo de Bielitz la fakultativan instruadon de Esperanto en la teritorio de Teszen (Polujo).

— La «Egipta Esperanto-Asocio» ĵus fondita en Aleksandrio tre vigle laboras klarigante kursojn kaj aranĝante publikajn paroladojn kaj agrablajn esp. festojn.

Ĝi aperigas «Egipta Esperantisto» kiel organon.

— La 15. de Decembro okazis en Genève la malkovro de memortabulo ĉe la domo kie loĝis D-ro Zamenhof en 1905.

Ĉeestis la aŭtoritatuloj kaj konataj Esperantistoj.

— La urbo Padova (Italujo), sekvante la ekzemplon de Milano kaj Cremona k. a., sin preparas por enkonduki Esperanton en superajn elementajn lernejojn kaj nun jam komencis kurson por 40 geinstruistoj, gvidatan ĉe supera urba lernejo.




BALDAU APEROS

NOVA VOJAĜO SENTIMENTALA

ANKAU NOMITA

LA APOLOGIO DE KATALUNUJO

katalune verkita de Agustí Calvet kaj tradukita de Jaume Grau Casas.



Aplec Esperantista del Vallès

Kiel en antaŭaj jaroj, la samideanoj el la Vallesa regiono decidis okazigi dum la venonta Pasklundo arbarfeston esperantistan en Ripollet.

Ĉeestos ĝin samideanoj el Sabadell, Terrassa, Rubí, Sardanyola kaj Ripollet kaj eble ankaŭ multnombraj Barcelonanoj.

La esperantistoj estos akceptataj de la Urbeŝtaro de Ripollet en la stacio, de kie oni aliros al la Urbdomo. Por tio la esperantistaj Grupoj estas petataj kunporti sian standardon.

Matene okazos esperanta diservo kaj religia festeto al la Virgulino de l'Espero, aranĝota de la Paroĥestro, la malnova samideano Pastro Planas. Ankaŭ okazos propaganda kunveno en teatro el Ripollet, komuna tagmanĝo kaj festo en la arbaro kun voĉkoncerto kaj se eble prezentado de esperanta komedio.

Ni esperas ke la nunjara «Aplec Esperantista del Vallès» estos, kiel la antaŭaj, ĉarma fratiga festo por la samideanaro kaj plia elmontro de esperantista vivo por la publiko.

Tiuj, kiuj deziras partopreni la komunan tagmanĝon, nepre devas enskribiĝi antaŭe. Prezo : 7 pesetoj.



Ĝis revido!

Per tiaj vortoj lastadiaŭis nin nia kara amiko Gili Norta, sur la ferdeko de la ŝipo lin kondukonta al Ameriko. Multaj esperantistoj respondis al nia invito iri al la haveno adiaŭi lin kaj dank' al tio ni povis dece montri nian estimon kaj dankon al la eminenta samideano, kiu tiel fervore laboris por Esperanto kaj tiel vigle plenumis la malfacilan taskon de Prezidanto de K. E. F. Ni deziras al nia samideano Gili Norta plej bonan vojaĝon kaj esperas la momenton ĝoje revidi lin inter ni.

ESPERNTAJ GAZETOJ

interŝanĝe ricevitaj de «Kataluna Esperantisto», publike legeblaj ĉe la legoĉambro de «Enciklopedia Popola Ateneo», Carme, 30, sidejo de K. E. F.

- | | |
|--|--------------------------------------|
| Egipta Esperantisto, Aleksandrio | Nova Tempo, Wien |
| Le Monde Espérantiste, Paris | Literaturo, Wolwyn Garden City |
| Esperanto-Praktiko, Berlin | Bulgara Esperantisto, Sofia |
| Belga Esperantisto, Gand | Ladina Patrujo, Bologna |
| La Marto, Haida | The British Esperantist, London |
| La Semisto, Sabadell | Nederland-Esperanto, Haag |
| Germana Esperantisto, Dresden | La Verda Ombro, Taihoku |
| Hispana Esperantisto, Madrid | Amerika Esperantisto, Boston |
| Katolika Mondo, Graz | Espero Teozofia, Praha |
| Espero Katolika, Udenhout | L'Esperanto, S. Vito al Tagliamento |
| Kristana Espero, Laihia | La Revuo Orienta, Tokio |
| Verda Utopio, Osaka | Arguso, México |
| Vegetarano, Haarlem | Brazila Esperantisto, Rio de Janeiro |
| Esperanta Finnlando, Helsingfors | Oficiala Gazeto Esperantista, Paris |
| La Esperantisto, Wien | Ĉeĥoslovaka Gazeto, Praha |
| La Laborista Esperantisto, Hannover | Nova Eŭropo, Praha |
| Nova Tagiĝo, Genève | La XIII ^a , Praha |
| Hungara Esperantisto, Szeged | Agitanto, Kronstadt |
| Esperanto Triumfonta, Köln | Bizantio, Konstantinopolo |
| Bulletin de la Société Française pour
la propagation de l' Esperanto, Paris | La Espero, Stockholm |
| Internacia Pedagogia Revuo | Sennacieca Revuo, Paris |
| Litova Stelo, Kaunas | Esperanto (U. E. A.), Genève |
| France-Esperanto, Paris | La Interŝanĝo, Béziers |
| | La Eklezia Revuo, Huddersfield |

NIA GAZETO ESTAS LA PLEJ LITERATURA

Jen kelkaj el la aperontaj verkoj :

LA KALIKOTA VESTO, Elena Alanic, trad. Isidre Torrents.

LA MAJA ARBETO, Hans Decker.

LA PUNINSTRUO, Josep Carner, trad. Josep Ventura.

Fragmentoj de la kataluna poemo LA ATLANTIDO, Jacinto Verdager, trad. Josep Grau.

LA SONGÔ DE L' EKZILITINO, Maria Elworthy-Posenaer.

PRI RIMO KAJ RITMO EN LA ESPERANTA VERSFARADO, Artur Domènech.

LA VERO, rusa fabelo (versaĵo), S. Frug, trad. Paul Medem.

NOVA VOJAGÔ SENTIMENTALA, ankaŭ nomita LA APOLOGIO DE KATALUNUJO, Agustí Calvet, trad. Jaume Grau.

LA BLUA KORTO, Santiago Rusiñol, trad. Estanislau Pellicer.

Dua ĉapitro de LA TALISMANO, Walter Scott, trad. Marian Solà.

HISTORIA RESUMO DE LA ESPERANTA MOVADO EN KATALUNUJO, D-ro Jacinto Bremón.

LA AMULETOJ KONTRAU LA MALBONA RIGARDO, Ivan H. Krestanoff.

Tradukoj el «KORO», A. de , trad. Luigi Puppò.

Tria ĉapitro de DON KIĤOTO MANĈO, Cervantes, trad. Jaume Grau.